

Михаил  
Лермонтов,  
Ангел

Михаил  
Лермонтов,  
Anĝelo

Михаил  
Лермонтов,  
La anĝelo

Михаил Лермонтов,  
The Angel

*tradukita de Vasiliĵ  
Devjatnin*

*tradukita de Boris  
Mirski*

*tradukita de N. N. 97*

По небу полуночи  
ангел летел,  
И тихую песню он  
пел,  
И месяц, и звезды, и  
тучи толпой  
Внимали той песне  
святой.

En mezo de nokto,  
en blua ĉielo,  
Traflugis kaj kantis  
plej bela anĝelo.  
Kaj nuboj kaj steloj  
kaj lun' en irado  
Atentis kun ĝojo je l'  
sankta kantado.

Kun kanto solena en  
nokta ĉiel'  
Sin portis mirinda  
anĝel';  
Kaj luno, kaj ste-  
loj, kaj nuboj en  
rond'  
Atentis la himnon de  
l' mond'.

At midnight an angel was  
crossing the sky,  
And quietly he sang;  
The moon and the stars  
and the concourse of  
clouds  
Paid heed to his heavenly  
song.

Он пел о блаженстве  
безгрешных  
духов  
Под кущами  
райских садов,  
О Боге великом он  
пел, и хвала  
Его непритворна  
была.

Li kantis feliĉajn, ne-  
niam pekantajn  
Spiritojn, kun Di' en  
ĉielo loĝantajn;  
Li kantis pri Patro  
ĉiela kaj tera—  
Kaj lia laŭdado ne  
estis malvera.

Li kantis pri vivo sen  
zorga ĉagren'  
Sub branĉoj de pura  
Eden';  
Kaj laŭd' al keruboj,  
al granda Sinjor'  
Elflugis sincere el  
kor'.

He sang of the bliss of the  
innocent souls  
In heavenly gardens above;  
Of almighty God he sang  
out, and his praise  
Was pure and sincere.

Он душу младую в  
объятиях нес  
Для мира печали и  
слез;  
И звук его песни в  
душе молодой  
Остался - без слов,  
но живой.

Animon tre junan en  
brakoj li tenis;  
En mondo malgaja  
naskiĝi ĝi venis.  
Kaj sono de l' kanto  
en juna animo  
Restadis sen vort',  
sed kun viva esti-  
mo.

En brakoj animon li  
portis al ter',  
Al mond' de  
malĝojo, mi-  
zer';  
Kaj restis la kanto  
en juna anim'  
Sen vorto, sen unu  
esprim'.

He bore in his arms a  
young soul  
To our valley of sorrow and  
tears;  
The young soul remembe-  
red the heavenly song  
So vivid and yet without  
words.

И долго на свете  
томилась она,  
Желанием чудным  
полна,  
И звуков небес  
заменить не  
могли  
Ей скучные песни  
земли.

Tre longe en mondo  
ĝi estis premata,  
Je revo mirinda pri  
Di' plenigata!  
Kaj ŝanĝi la kanton  
de l' sankta sin-  
cero  
Ne povis por ĝi ĉiuj  
kantoj de l' tero.

Kaj plena je stranga,  
mirinda dezir'  
Ĝi vagis en mond' de  
sopir',  
Kaj tedis al ĝi post  
la kant' de l' eter'  
La veaj motivoj de l'  
ter'.

And long did it struggle on  
earth,  
With wondrous desire im-  
bued;  
But none of the tedious  
songs of our earth  
Could rival celestial song.

...

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas* МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27).

*Arg-1039-2110* (2014-06-03 12:23:12)

*Pri la poeto Lermontov vidu la retejon* [http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил\\_Lermontov](http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил_Lermontov).

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de* МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) *en Esperanton de* VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).

*Arg-1039-2114* (2014-06-03 12:21:00)

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de* МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) *en Esperanton de* Boris Mirski.

*Arg-1039-2113* (2014-06-03 11:55:42)

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en* <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de* МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) *en la Anglan de* N. N. 97.

*Arg-1039-2111* (2014-06-03 11:29:07)

*Tiu ĉi laŭvorta poem-angligo troviĝas en* <http://max.mmlc.northwestern.edu/~mdenner/Demo/texts/angel.html>.